

Stella, kara Stella

15 SEPTEMBRO 1922 - 21 JUNIO 2020

En la vespero de la 21a de junio 2020 forpasis unu el la plej malnovaj membroj de SAT. Ŝi estis unu el tiuj membroj kiuj ne volas esti membroj de UEA kaj ankaŭ ne kun klubo ligita al ĝi.

En 1948 aŭ 1949 ŝi lernis Esperanton ĉe la ABVV (belga sindikato maldekstra) en unu el la lernejoj kiuj apartenis al la urbo. Pro sia konvinko ke oni ne lernas la lingvojn por nur diskuti pri ili, ŝi ne aliĝis al UEA sed al SAT, ankaŭ ĉar ŝi estis “laboristo” en la metio kiun ŝi praktikis.

Ŝi estis konvinkita Esperantisto kaj SAT-ano kaj propagandis por SAT ĉe ĉiuj novaj uzantoj de la lingvo.

Mi vidis Stellan la unuan fojon en *La Verda Stelo*. Kiel ĉiam ŝi faris notojn pri la kunsido. La duan fojon ŝi jam diris al mi pri SAT kaj ke mi certe devas ekkoni ĝin, sed nur en 1993 mi iĝis membro, ĉar mi unue devis lerni la lingvon por ke iu komprenu min.

De tiam estas nur SAT, Stella kaj mi, kiuj faris demandojn pri problemoj kaj malproblemoj kiujn mi havis kun Esperanto kaj ĝia movado.

Stella estas miraklo, ŝi estas kvazaŭ mia patrino pri Esperanto.

La lastajn jarojn ŝi vivis en oldulejo. Certe ne tiel komforte kiel ŝi estis hejme, sed ŝi estis kiel ĉiam kontenta kaj montris feliĉon.

Mi pensas unu el la plej bonaj momentoj estis kiam iu Esperantisto vizitis ŝin (aŭ Vinko la prezidanto de SAT; mi scias ke li estas la prezidanto de PK, sed ni parolas ĉiam pri SAT).

Stella estis iu, kiu ne multe parolis pri si mem. Sed kiu konas ŝin scias ke ŝi estis virino kun ora koro. Ŝi estas



Esperantisto, jes tio ŝi estis.

Kvankam mi ne sufiĉe ofte vizitis ŝin mi devas diri ke mi multe malhavas ŝin.

Stella, kara Stella.

JAKVO SCHRAM